# *Ricevos Fidel distingon de la Nacia Kongreso de Honduro.*



Speciala distingo al la komandanto Fidel Castro pro lia projekciado en Honduro favore al sano kaj edukado de tiu popolo estos transdonata de la nacia kongreso de tiu lando.

Anka? la kuba popolo ricevos la honorojn de la hondura kongreso per la Medalo de Oro kaj atestilo dum ceremonio solena.

La distingon ricevos la kuba ambasadoro en Honduro, Sergio Oliva, en ?eesto de la estroj kaj kunordigantoj de la kubaj kuracistaj brigadoj kiuj laboras en tiu lando.

La distingon proponis la deputito de la partio Libereco kaj Refondo (Libre), Scherly Arrigad, kaj ?in subtenis la nacionalista, Oswaldo Ramos Soto, prezidanto de la le?ofara komisiono, kiu prizorgos la efektivigon de la iniciato.

Kubo kunlaboras kun Honduro en la prisana sektoro ekde la jaro 1974, kiam la lando estis dama?ita de la uragano Fifi, kaj same okazis dum la tragedio ka?zita de la uragano Mitch. Aliflanke, ?irka? 1 345 honduranoj studis medicinon en la Latinamerika Lernejo de Medicino (ELAM) en Kubo.

La kuba misio kuracista en tiu lando, je la monato julio ?i-jare, nombris totale 27,6 milionoj da kazoj atentitaj en diversaj areoj, de post 16 jaroj de laboro.

(kun informoj de El Heraldo.hn)

https://www.radiohc.cu/index.php/eo/noticias/nacionales/65196-ricevos-fidel-distingon-de-la-nacia-kongreso-de-honduro

# Radio Habana Cuba